PENSEO

N-ro 335
sept. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Vejdo (Ĉinujo)



Surluniĝo

1

Cirkulas ĉina mit-rakonto pri Chang'e,
kiu antaŭe vivis alte sur ĉielo,
kaj kies edz' Yi, meritplena brava fe'
mortigis ĉieldian filon kun ribelo.

Pro tio ilin teren pelis Ĉieldi' ,
kaj l' par' feliĉe vivis memkontente.
Yi lertis en militaj artoj kun defi',
defendis la vilaĝon jen ĉiumomente.

Bravuloj multaj ĵuris obeiĝon al li,
kaj inter ili enmiksiĝis jen aĉulo,
kiu deziris la profiton sur lin fali,
kaj sin ŝajnigis jen fidela sen mav-brulo.

Lernigis Yi al ili militarton pene,
vicaro lia sin ekzercis vigloplene.

2

L' patrin' de Ĉieldi' kompatis pro forpelo
la paron kaj donacis unu fe-pilolon
al ili, tiel ke ilia viv' en vero
eterne daŭros eĉ sen perdi tempocolon,

post kiam ili ĝin englutos po duono
da fe-pilolo, sed se unu voros sola
ĝin, li aŭ ŝi ekflugos al ĉiel' en zomo.
Ĝojplene ili tenis ĝin en kest' memora.

L' aĉul' sciiĝis pri l' sekret' per fi-rimedo,
kaj li decidis gajni l' fe-pilolon prove.
Post kelkaj tagoj Yi foriris por ĉas-predo
kaj Chang'e sola restis hejme ja senmove.

L'aĉul' eniris ŝian domon tute ŝtele,
eltrudis de ŝi la pilolon malsincere.

3

Panike ŝi elprenis la pilolon fine
kaj tuj englutis ĝin eĉ sen lia konsci'.
Li ne sukcesis ĝin akiri kaj deprime
foriris nure kun despera agoni'.

Tiame Chang'e sentis korpon en leĝero,
ne povis stari firme ŝi kun paŝo skua.
Tuj poste ŝi ekflugis lante en aero,
tra densaj blankaj nuboj ĝis ĉielo blua.

Kiam Yi de ĉasad' revenis, ne sukcesis
ŝin trovi ie, li ŝin serĉis ja ne plu
je la ekpenso pri l' pilolo. Li karesis
la bruston kaj rigardis al ĉiela blu'.

Jen li ŝin vidis en la blanke brila luno,
verŝajne ŝi ridetis kontraŭ li en nuno.



4

Ja Chang'e ekis loĝi en la luno vere,
kaj l' edzo kun klinita kresto veis ade.
Li volus flugi ankaŭ al ĉiel' prefere,
sed ĉu sen fe-pilolo iri nub-boate?

Ha, nun jam surluniĝis lunsondilo ĉina

sur foran flankon de la luno jen stabile.
Ankoraŭ mi ne scias, ĉu l' sondil' fascina
jam ŝin renkontis, kaj rekonis laŭdezire.

La revo de Yi baldaŭ realiĝus certe,
se li anoncus sin pli frue por vojaĝo,
ĉar la spacŝipo homportanta laŭaserte
pafiĝos por atingi l' lunon kun kuraĝo.

Yi, nia praprapatro, flugu kun fervoro
al lun' por vidi vian karan en la koro.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Senkolora tago

La nigra-kaj-blanka urbo,
kovrita de pluv' kaj frido,
mateniĝis, kiel multaj
je l'espero senigitaj.
Maria Nazaré Laroca

Juiz de Fora, 04/08/2019.

Dankemo al la patroj

Per ĉipreskaŭa poemo,
mi dankas al ĉiuj patroj,
kiuj ame min akceptis
en la migrad' de l' miljaroj.

Kaj plej akras la sopiro
pri tiu en la memoro,
kiu homo faris min
dum l' alfrontoj de la vivo.

Mia koro multe dankas,
per ĉisenvorta pulsado,
en tute silenta preĝo
al Patr' de ĉiuj animoj!



Juiz de fora, 10/08/2019.

Yanke (Ĉinio)

Sopiro al vi en la foro

Se la urbo estas sen ĉeesto de vi,
ĝi fariĝas jam dezerta.
Arboj en proksim' kaj domoj en la foro
jen elspiras fridon kaj tristecon.
Aŭskultad' al pluva tiktakado
kaj rigardo al folioj falaj
ja elvokas de mi la sopiron al vi,
sed ĉu vi sopiras al mi ankaŭ?

Por forpeli solecon
mi aŭskultas al muziko
per kapaŭdilo.
tamen mi pliigas ĝenojn male
al jam tumultanta menso mia.
Volas mi zorgeme legi libron,
mia koro tamen flugi for
anstataŭ subpremi la sopiron.

La sopir' de unu homo
farbas la sezonon tutan
per malseka la koloro.
Izolitec' similas tason da ebriigaĵo,
la sopiro la kaptilan reton.
En ĉi frostaj tagoj kun flirtanta neĝo
ĉu vi ankoraŭ ja bone fartas
en nebula malproksimo?

Se la viv' estus rivero

Se la viv' estus rivero,
mi ĝin tenus en fluanta viglo
kaj en ĝoja rapidritmo,
kun fidemo al la fino.

Dum fluad' troviĝas
jen neeviteble kurboj,
danĝerplena akvkirliĝoj,
spitu ilin tamen, marŝu.

Kun la temp' ĝi fluu


pace kaj trankvile,
eĉ en minaca ŝtormo
kaj kaŝita kontraŭforto.

Sub ardanta suno
kaj lunlumo friska
ĝi sin rulu ne tro alten
pro ekzalto nekonvena.

Ĉiam kun anim' egala
kaj kvieta ĝi sin tenu
ne aroga nek fiera
dum la tuta kurso.

Jen proksima al la fino
de la viv' ankoraŭ
ĝi trankvile kiel ĉiam
fluu pace sen bedaŭro.

Miric Jadranka (Serbio)




Pardonu, filo

Pro sendormaj noktoj
Kiam mi kantema mutis.
Pro amo de vi ŝtelita
al rifuĝintoj donita .
Pro larmoj en okuloj ruĝantaj,
En okuloj miaj kutime ridetantaj.
Pro horoj pridiskutitaj pri senhejmuloj
aŭ pri militrifuĝintoj aŭ pri aliuloj.

Pardonu, filo
Kulpas mia kor' kompatema,
Kaj suferanta anim' helpema.
Hazarde ŝtelinte de vi paciencon
de bonkora anim' via tenerecon
ŝuldos mi, al vi, kara ci.

Pardonu, filo
Pro viaj senzorgaj horoj perditaj.
Pro miaj pensoj al aliuloj dediĉitaj
Pro longdaŭra en mondo kreskanta
malamikec',
Ne alvokita nek aprobita de vi.
Pro neniam revenonta via infanec'.
Ĉu vi iam povos min kompreni
pro tiom da panja konfesa sincerec'.?

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Nedaŭro

ĉiuj floroj mortantaj
ĉiu abortita verso
printempoj ja revenantaj
ĉiu ciklo de l' universo

La batado

ĉiu batad' infanaĝe
hodiaŭ min ĉasas jukas
kia sparko fajrujo

ĉiu juko iĝis moko
dum el vivo nur mi volis
kareson kaj kokosaĵon

kiam panjo ekkoleris
la batado venis tuj.
trotuare nun jen mi
kiu sin ĉasas kaj jukas

ĉu la viv'
ĉasas min?
kia laciĝ'!

Sveta Konjashova (Rusio)



Soleco. Teo. La gazeto.
Novtago. Danko kaj rideto.
Malgravas gutoj trans tegmento.
Ekzistas nune nur l'momento.
Finighis l'tempo de Morfeo:
Mateno. Pluvo kaj " Penseo".

Fernando António Nogueira Pessoa (Lisbono 1888 —1935)

Jenas ĵusa provo mia traduki versaĵon de portugala poeto Fernando Pessoa. En traduko oni preskaŭ senescepte faru elektojn, des pli ke temas soneton kie

Pessoa montras sian personan koncepton de arto... Eblis teni la ritmon de la fontteksto per sama silabonombro, samajn rimparojn mi uzis. La simbole trioblan ripeton de la radiko tromp- kaj de la vorto doloro en la unua strofo tamen ne... Mi esperas ke perdoj ie kaj tie kompensiĝis. Ĉu ?...

AŬTOPSIKOGRAFIO


Ĉu ne trompas do poet' ?
Trompul' estas li kaj fajna.
Ĉu doloro en sonet'
ne vundas kvazaŭ verŝajna !?
Ja, kaj okaze de l' lego,
ĉu ne l' sentata dolor'
iĝas ne plu sub la rego
de li pro novsent' el for' !?...
Jen re kaj re en rondiro,
postiranta la raci' ,
eta trajn' korda, sen miro:
kor' estas la nom' de ĝi ...

William Blake

AMĜARDENO

Mi reiris al la Amoĝardeno,
kaj io tie lasis min sen spiro:
Kapel' stare en la centra areo,
mia verda ludlok' , nun resopiro.
Tute fermita estis la Kapelo,
kaj "Vi senrajtas" mi legis ĉe l' pordo.
Al l' Amĝarden' mi donis la atenton,
kie iam floroj dolĉis laŭ l' bordo.
Sed la ĝarden' estis vico da tomboj,
tomboŝtonaro astataŭis florojn ...
Kaj Pastroj nigratalare decis siajn
rondojn fare:
miajn sonĝojn , per erik' , postlasante
en implik' .

Tradukis



Wel CR (Brazilo)

Joachim Ringelnac

Mi tiel amas vin

Mi tiel amas vin!
Mi al vi, se vi ĝin bezonus,
eĉ kahelon el mia forno
donus.

Mi ne malicis al vi, hoj!
Min kaptas sento de trist'.
Ĉe l'deklivoj de l' fervoj'
lumas abunde genist'.

Jam for – bedaŭr'.
Mi vin ne forgesas,
vojaĝas.
Ĉio kun longa daŭr'
mildsaĝas.

La temp' sur voj'
ĉion fi-negas.
Jen eĉ boj',
la hund' ne legas,
skribul' ne estas.
Pro dev' ni ne restas.

Mi ridas.
Kribrile truoj gravas iel
plej je la fin'.

Mi tiel amas vin.

Frederiko Hölderlin

Duono de l' vivo

Per flavaj piroj pendas
kun ar' de ruĝaj rozoj
terpec' sur la lag'.
Graciaj cignoj,
ebriaj de kisoj
vi trempas vin

en akvon sanktan kaj sobran.

Ho ve! De kie mi,
se vintros, florojn prenu,
sunbrilojn do
kaj ombrojn de l' tero?
Jen muroj nur,
senvorta frid', envente
klakas la flagoj.

Tradukis



Hans-Georg Kaiser
(Germanio)

Mimoza Ahmeti



Nenion por diri

Iam ili min aldiris
Ĉion rakontante,
Ĉion dirante

Ankaŭ ci mem diradis
Ke tiom multe min amis
en la noktoj de la frenezeco
en la noktoj de la ameco.

Nenion por aldiri min
Nenion por doni min

Du pendantaj kapoj
Sur la forgesitaj ŝultroj
Mortinta amo,
Enamiĝintaj mortintoj.

La vento

Tiu silento de la folioj
Tiu nemoviĝo de la sekigitaj langoj
Sub la ruĝetaj suspendaj nuboj;
Tiu momenta elano
Igas min kuri kiel la vento
Por konvinkiĝi ke mi vivas,
Por kompreni ke ie vi estas,
amo, animo, arda revo,
Kiel mi levis vin iam per miaj brakoj,
Tempesto je kisoj de la kapo orokula;
Fulmo flamiĝinta en la sino...

Tiu silento de la paroloj
tiu nemoviĝo de la sekaj langoj
iganta min ŝtormi kiel la vento.

Ne tuŝu min

Ne tuŝu min, ne veku min
Per la manoj de via praktika racio.
Ne levu min de la milita dormo,
La plej peniga, plej perturba dormo..

Sonĝoj kun mortigitoj, kun brulantaj
ĉieloj
Kaj tondroj eĥantaj al mia amo postdorse.
Jen la ĉielo brulis je milan fojon
La karbardaĵaro enfalis en la okuloj kiuj
ruĝiĝis,
Per ambaŭ manoj mi kovras la vizaĝon de
mia amato,
Timante ke la kuglaĵero splitas la ties
cindron
(Kiom mi amas lian dolĉetristan vizaĝon).

La amikino transe kuras bandaĝita
tutblanke.
Ŝi ĉiam frapiĝas sed neniam
Sukcesas komplete mortiĝi...

Ne tuŝu min, ne veku min
Per la manoj de via praktika racio.

elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Wang Ji (ĉ. 589 – 644)

En drinkejo

Ĉi tagon mi drinkadas ĝiskonfuze,
Sed ne por min kulturi animnobla.
Nun ke aliaj ĉiuj ebriiĝis,
Kiel mi povus sole resti sobra?

Wang Fanzhi (? - ?)

Sen titolo

Aliaj rajdas sur ĉevalo granda,
Sed nur mi sur azeno. Rerigarde
Al la portanto de brulligno peza,
Mi sentas min nun iom bonhazarde.

Yu Shinan (558 – 638)

La lampiro

Kun eteta lum' flagranta,
Flirtas ĝi leĝere fole.
Por altiri la rigardon
Blinkas ĝi en nokto sole.

Liu Changqing (ĉ.726 – ĉ.786)

En nokta neĝoŝtormo

La montoj foraj nebuliĝas ĉe vespero,
Povriĝas en la frosto l' neĝkovrita domo.
Ekbojas hundo ĉe la pordo branĉplektita,
En nokta ŝtorm' videblas revenanta homo.

Luo Binwang (ĉ. 619 – ĉ.687)

La ansero

Ho ansero, ansero, ansero!
Kun la kolo kurbema ĝi kantas al blua ĉielo.
Sub la blanka plumaro ĝi flosas sur verda la akvo;
Per la ruĝaj piedoj ĝi puŝas sin en flu-ŝancelo.



Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)

Yan Shu (991-1055)

Tiuj dens-skribitaj vortoj

—laŭ melodio *Serena muziko*

Tiuj dens-skribitaj vortoj
sur la ruĝa fajna leteropapero
jam al ŝi esprimas
mian korinklinon kun sincero.
Fiŝo naĝas jen en akvo,
nube flugas ja sovaĝansero*,
en ĉagreno mi ne scias,
kiu, ve, el ili povus kun espero
sendi al ŝi mian kor-amsenton?

Sola mi min apogas sur la
balustrado
sur la okcidenta turo ĉe vespero.
Transaj montoj baras al mi
vidon al fenestr' de ŝia ĉelo.
Kie ŝiaj vangoj rozkoloraj
nun sin kaŝas jam per malapero?
Dume verdaj ondoj
antaŭ domo ŝia ja konstante
fluas orienten kun libero.

**En antikva Ĉinio oni uzis fiŝon kaj sovaĝanseron kiel simbolon de mesaĝ-sendanto.*

Hirundoj alflugis

—laŭ melodio *Kavalira danco*

Hirundoj alflugis ĉe l' kulto
al ter-di' en printempo,
la Klaro kaj Bril'* per alvago

aliros por pirflor-falado.
verdmuskoj elkreskis sporade
sur l' akvosufaco de l' lago.
Aŭdiĝas jen du aŭ tri pepoj
jen el orioloj el sub arbfolioj.
Dum jam plilonĝinta la tago.
Salikaj florflokoj ŝvebadas leĝere.

Survoje knabinan najbaron
ridantan mi trafis hazarde
portante kun moruskolekta la sako.
Mi miras, ke havis mi belan
la sonĝon lastnokte
kaj vere mi gajnis per unu dehako
en lud' herbplektado!
Pro tio fiera rideto
aperas sur miaj du vangoj.

la Klaro kaj Brilo estas unu el la sunperiodoj, kiu komenciĝas je la 4-a, 5-a aŭ 6-a de aprilo.

Ekster balustrado

—laŭ melodio *Papilio super floroj*

Ekster balustrado
krizantemoj vualiĝas en nebulo trista,
orkideoj ploras per rosolarmado.

Silkaj kulvualo
jen kaj jen elspiras
delikatajn malvarmetojn.
Jam forflugis hirundparo
sen kialo.

La lunlum' arĝenta,
ne sciante pri disiĝ-doloro,
jen filtriĝas tra l' fenestro mia
prifarbita per cinabr-koloro
en oblikvaj silkoj
ĝis aŭroro.

Vent' el okcidente
lastanokte violente
mordis verdan arbon
lupodente.

Sola mi ascendis turon,
kaj rigardis tra nebulo
la vojokonturon
en lastnokta la obskuro.

Volas mi al mia kara
sendi la leteron pri amsento,
sed, ve, kiel muro bara
montoj kaj riveroj servas.
Kie la amat' troviĝas
en la for' malklara?

Sur antikva vojo


—laŭ melodio *Melodio magnolia*

Sur antikva vojo
borderita per salikoj, verdaj herboj,
ĉe ĝisdira pavilono,
de li mi disiĝis kun malĝojo,
sed li ekveturis ŝajne
kiel facilkura rojo.

Tuj proksime al la aŭrorfalo
tambursonoj por raporti tempon
min atingis kaj min vekis
el la sonĝ-finalo.
Tuj min kaptis la disiĝdoloro
kiel marta pluv' ŝutita, frida,
ĉe l' radik' de floro.

Senkorulo ne komprenas vere
la sentemon de sentimentala ino,
kies colo da sopiremo malespere
iĝas sentfadenoj jen sen fino.

Oni povas tra abisma malproksimo
ja atingi maron kaj l' ĉielon,
sed la sopirem' kaj korinklino
longe, longe daŭras, ve, sen limo.



Elĉinigis **Vejdo (Ĉinio)**

—2007—



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKNAŬA

Plena kompreno pri la vivo

§19-06

Vestita en nigra robo, la oficisto, kiu plenumis oferajn ritojn, iris al la porkostalo kaj diris al la porkoj:

"Kial vi devas timi la morton? Mi nutre grasigos vin dum tri monatoj. Poste, post dek tagoj da abstinado kaj tri tagoj da fastado, mi sternos por vi blankajn stipojn kaj metos viajn ŝultrojn kaj postaĵon sur skulptitan ofervazon. Ĉu vi konsentas pri tio?"

Se li pensis por la bono de la porkoj, li preferu nutri ilin per grenŝelo kaj rekremento kaj lasi ilin en la stalo. Se li pensis por si mem, li devus diri, ke li deziras vivi en honoro kaj eminenteco kaj, post la morto, kuŝi en luksa ĉerko sur ornamita ĉerkoveturilo. Kiam li pensis por la porkoj, li devus forlasi la blankajn stipojn kaj la skulptitan vazon; kiam li pensis por si, li devus alpreni, kion la porkoj rifuzus. Kia do estas la diferenco inter la "por la porkoj" kaj la "por si"?

§19-07

Kiam la duko Huan de la regno Qi faris ĉasadon en marĉejo, Guan Zhong, lia ministro, estis lia ĉarokondukanto. La duko ekvidis fantomon. Li metis sian manon sur tiun de Guan Zhong, dirante:

"Kion vi vidis?"

"Nenion," diris la ministro.

Reveninte al sia palaco, la duko falis en malsanon kaj ne aperis en la kortego dum pluraj tagoj. La kortegano Huangzi Gao'ao lin vidis kaj diris:

"La malsano de via duka moŝto ja venis el vi mem. Kiel fantomo povus fari malbonon al vi? Kiam la spiro, kiu estas retenata en la korpo, disiĝas kaj ne revenas, oni suferas nesufiĉecon de spiro kaj energio. Kiam la spiro iras nur supren kaj ne iras malsupren, oni fariĝas kolerema. Kiam la spiro iras nur malsupren kaj ne iras supren, oni fariĝas forgesema. Kiam la spiro iras nek supren, nek malsupren, oni povas fali en malsanon."

"Sed," demandis la duko, "ĉu do vere ekzistas fantomoj?"

"Certe," respondis Huangzi Gao'ao. "Ekzistas la *Lü* en la koto kaj la *Ji* en la kuirforno. Ekzistas la *Lejting* en la ejo por forĵetaĵoj en la domo, la *Bei'a* ĉe la murangulo nordorienta, kaj la *Yiyang* ĉe la murangulo nordokcidenta. Ekzistas la *Wangxiang* en la akvoj kaj la *Shen* sur la montetoj. Ekzistas la *Kui* sur la montoj, la *Panghuang* sur la ebenaĵoj kaj la *Weiyi* en la marĉejoj."

"Ĉu mi povus demandi," demandis la duko, "sub kia formo prezentiĝas la Weiyi?"

"La *Weiyi* estas granda, kiel nabo de rado, kaj longa, kiel timono de ĉaro. Ĝi portas purpuran veston kaj skarlatan ĉapon. Tiu ĉi estaĵo timas la rulbruon de la tondro aŭ ĉaro. Kiam ĝi aŭdas tiajn rulbruojn, ĝi haltas kun la kapo en siaj manoj. Tiu, kiu vidas ĝin, povas fariĝi la ĉefo de ĉiuj aliaj princoj."

La duko ekridis el la tuta koro, dirante:

"Tio estas ĝuste la fantomo, kiun mi vidis."

Poste li reĝustigis siajn vestojn kaj ĉapon kaj denove sidiĝis por daŭrigi la paroladon kun Huangzi Gao'ao. Kaj li ne plu sentis sin malbone antaŭ ol la tago forpasis.

§19-08

Ji Shengzi dresis batalkokon por la reĝo Xuan de la regno Zhou.

Post kiam pasis dek tagoj, la reĝo Xuan demandis:

"Ĉu la koko jam estas preta por batalo?"

"Ankoraŭ ne," respondis Ji Shengzi. "Ĝi

estas ankoraŭ aroganta kaj malmodesta.”

Pasis ankoraŭ dek tagoj. La reĝo Xuan ree demandis kaj Ji Shengzi respondis:

“Ankoraŭ ne. Ĝi ankoraŭ krias responde al la sonoj kaj reagas ĉe la vido de ombro.”

Pasis ankoraŭ aliaj dek tagoj. La reĝo Xuan refoje demandis kaj Ji Shengzi respondis:

“Ankoraŭ ne. Ĝi ankoraŭ furioze rigardas kaj estas atakema.”

Pasis ankoraŭ aliaj dek tagoj. La reĝo Xuan refoje demandis kaj Ji Shengzi respondis:

“Ĝi jam estas preskaŭ pretigita por la batalo. Kiam aliaj kokoj krias, ĝi ne respondas. Ĝi aspektas kiel ligna koko. Ĝia virto estas kompleta. Aliaj kokoj jam ne kuraĝas defii ĝin. Ĉe la vido de ĝi ili tuj turnos la dorson kaj forkuras.”

§19-09

Kiam Konfuceo faris turisman vojaĝon en Lüliang, li admiris la tiean akvofalon, kies faldistanco estis 30 *ĵen*-oj. Ĝi muĝis kaj ŝprucis je 40 li-oj malproksimen. Ĝi torentis tiel rapide, ke neniaj testudoj, fiŝoj kaj aliaj akvaj vivaj estaĵoj povis naĝi en ĝi. Subite, Konfuceo ekvidis viron, kiu naĝis en la torenta akvo. Pensante, ke la viro certe suferas ian malfacilegon en la vivo kaj volas sin dronigi, li ordonis al siaj disĉiploj, ke ili kuru laŭlonge de la torento por lin savi. Sed tiu viro ĉiam flosis en la akvo, antaŭ ol li fine eliris el la torento malsupre je centoj da paŝoj. Kun la haroj pendantaj sur la dorso, li kantante promenis laŭlonge de la bordo.

Sekvante lin Konfuceo demandis:

“Mi pensis, ke vi estas fantomo, sed nun mi scias, ke vi estas homo. Ĉu mi povus demandi, kian specialan metodon vi havas por tiel facile naĝi en la akvo?”

“Ne, mi havas nenian specialan metodon,” respondis la viro. “Mi komencis per alkutimiĝo. Poste mi perfektigis mian kutimon, kiu fariĝis kvazaŭ mia naturo, kaj fine mi sekvas la destinon. Mi lasas min peli en la akvokirlo, kaj flosas kun la torento. Mi simple akomodas min al la akvo kaj neniam penas igi la akvon akomodiĝi al mi. Jen kial mi povas tiel libere naĝi en la akvo.”

“Kion do vi volas diri per tio, ke vi komencis per alkutimiĝo, kaj poste vi perfektigis vian kutimon, kiu fariĝis kvazaŭ via naturo, kaj fine vi sekvas la destinon?” demandis Konfuceo.

“Mi naskiĝis en la monteta regiono,” li respondis, “kaj tial mi kutimis al ĝi. Mi elkreskis ĉe la akvoj, kaj tial mi alkutimiĝis al la akvo. Fine mi naĝas tiel facile, ke mi ne scias, kion mi faras, kaj tial mi sekvas la destinon.”

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Ido de kaldrono

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti
pruntis de riĉul’
tre avara kaldronon
per lupago je kalkul’
ja kun kolerbrul’.

Post tagoj
Afanti saĝe
elcerbumis rimedon
kaj eldiris kuraĝe
al li malplaĉe:

"Mi havas
informon por vi—
tre bonega novaĵo!
La kaldrono, mia Di',
eĉ naskis al ni

ja idon!
Jen bonaĵo, ĉu?"
"Sensencaĵo!" respondis
la riĉul' en voĉa bru'
kaj aldonis plu,

"Ĉu kaldron'
povus naski jen
idon en via mano?"
Afanti kun ruzmien'
ovris per man-ten'

la sakon,
elprenis el ĝi
kaldroneton kaj diris:
"Jen estas ĝia id' ĉi!
Ne ĝin kredas vi?"

La riĉul'
pensis ĝojplene:
"Kial mi ne profitas
kaj akiros senpene
iom senĝene."

L' avarul'
jen ŝajnigis sin
ĝoja kaj ruze diris:
"Ho, estas bona destin'
por mi en fascin'

ke mia
kaldron' magia
naskis idon kaj naskos
multe da idoj pliaj
kaj korp-graciaj.

Do, zorgu
pri la kaldrono,
neniel difektu ĝin!"
Afanti laŭ l' ordono,
kun naza sono,

"Ja bone,
bone, via moŝt',
mi flegos ĝin zorgeme,
kaj protektos ĝin en post'
je ĉia ajn kost'!"

Post tagoj
Afanti venis
kaj diris al la riĉul':
"Via kaldron' forsvenis,
ja morte senis."

"Kiele!"
miris la riĉul'.
"Kiel povus la kaldron'
morti? Ĉu l' kadavr' sen spur'?
Ĝi iĝis eĉ nul'?"

Afanti
diris ruzeme:
"Mi jam ĝin enterigis,
kaj ne povas jen plene
doni konvene

kadavron
ĝian nun al vi."
Ili arde kverelis
jen pri ekzisto de ĝi,
kun mallaŭta kri'.

La riĉul'
timis, ke l' kverel'
allogos najbarojn kun
malfavora konsider'
al li en koler'.

Jen vere
l' aliaj venis
kaj li honte foriris.

Finfine li komprenis,
li stulte scenis.

Afanti
ne volis vere
lian kaldronon fakte
sed mokis lin prefere,
al venĝo cele.

Miric Jadranka (Serbio)

Militŝtormoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Hejmloko
Ploranta.. Solis
ŝi sencele paŝanta.
Rifuĝintoj jam ŝokis.
Multaj pereis.

Kolonoj.
Kiel pluv' ploroj.
Jam aŭdiĝis pafadoj.
Kriaĉoj. . stop al movoj..
Faladas bomboj.

Ve krioj!
Atak' kruelas.
Fuĝo tien alien
Vidaĵo, ja malbelas.
Eĉ tag' malhelas.

Nigriĝis
Ĉio el fumo
Aperis hom' vundita
Serĉanta iun. puno .
Ĉu sort' sen suno.

Malgajas
Rakontoj tiaj.
Ekstermita popolo.
Longas kolonoj postaj.
Ho, serboj piaj.
Suferoj
Kaj doloroj, ho,
Subbrake longe paŝas.
Falsaj esperoj jam tro.
Savas nin kredo .

Luiza CAROL (Israelo)



SOPIRO EN AŬGUSTO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Feliĉo
estas libere
flugi super la mondo,
vivi tute sincere
kaj sendanĝere.

Vejdo (Ĉinio)

Al Luiza Carol

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Alvenas
el Israelo
kelkaj ĉineskaj versoj
ja inspiraj per belo
de verd-espero.

Luiza,
kara amikin',
verkas la ĉineskaĵojn
kun sincera am-inklin'
per kora esprim'.

Sopiro
via al paco
de naturo ja estas
al ni bela donaco—

via sagaco.

Dankegon
jen al vi Carol!
Ni verku kune l' versojn
por la Esperanta rol'
kun insista vol'.

Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).

Mikronoveloj

Dimitrije Janičić (Serbio)



LA AMO

Ĉapitro 1
Ŝi amas amon.
Ŝi amas ami.
Ŝi amas ke aliaj amas ŝin.
Ĉapitro 2
Mi amas ŝin kiu amas ami.
Ĉapitro 3
Ŝi, kiu amas ami – amas min.
Ĉapitro 4
Ni amas unu la alian.

* * * *

En vagono de metroo

1. En vagono de metroo knabo manĝetas. Lia patrino rakontas al li: "Filĉjo, tri ŝafoj troviĝas en vagono de metroo. Dumvoje eniras lupo. Do kiom da ŝafoj restas?" La knabo memfideme respondas: "Neniu ŝafo restas, ĉar ili estas formanĝitaj de la lupo. Tion mi jam scias." Sed la patrino replikas: "Vi malpravas. Restas ankoraŭ tri ŝafoj, ĉar estas malpermesite manĝi ion ajn en la vagono de metroo."

2. En vagono de metroo mi trovis viron kun nuda torso. Mi plendis pri lia malbona konduto. Iom poste mi trovis, ke ili estas tri familianoj kaj la patro demetis sian veston por kovri per ĝi sian filinon, ĉar la klimatizita vagono estas tre malvarmega. Kiel granda amo de la patro al la filino!

Harkolorigo

Hodiaŭ mia patro kolorigis al si la harojn. Mi demandis al li: "Paĉjo, kial vi kolorigas nigre viajn grizblankajn harojn? Vi aspektas normale en mezaĝo kun grizblankaj haroj. Ĉu vi volus per tio allogi...?" Li respondis: "Ĉiufoje kiam mi reiras al la hejmo de miaj gepatroj, mi kolorigas miajn harojn nigre, tiel ke via avinjo rigardas min juna kaj ŝi mem sentas sin ne maljuna."

Maljunaj geedzoj

Najbare de mia domo loĝas maljunaj geedzoj. Hodiaŭ la maljunulino petis de mi helpon por ripari la difektitan kranon en la kuirejo. Ŝi elprenis kesteton de iloj. Kiam mi uzis ŝraŭbilon, kelkcent da juanoj falis el ties tenilo. Ŝi suspire diris, "Estus pli bone, se mi trovus tion du jarojn pli frue. Nun li suferas de apopleksio kaj mi sentus honton bati kaj prisakri lin pro tio."

En restoracio

En restoracion eniris homo kun malpura vesto. Li petis de la mastro bovlon da nudeloj. Li diris, ke li perdis la monujon kaj ne povas reiri hejmen, kaj ke nun li sentas teruran malsaton. Sen ajna vorto la mastro iris en la kuirejon kaj alportis bovlon da nudeloj al li. Post kiam li voreme formanĝis nudelojn, la mastro donis al li tricent juanojn. Aliaj klientoj asertis, ke la mastro estas trompita kaj li estas trompisto. La mastro nur diris, ke li ne metis salon en la nudelojn.

reskribis laŭ interretaj fontoj

Fangfang (Ĉinio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penlisto.htm
_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_